FN PER ANC 47


# NORMANDA ESPERANTO - BULTENO

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

N° 23 - MARS 1973 -


Redaktas : S-ro E. JOUIS - 62I, rue G. Mugnier 76 - BOISGUILLAUME

Sendu la manuskriptojn antaŭ la :
I0a de Februaro, I0a de Majo, I0a de Aŭgusto, I0a de Novembro -

E N H A V O


- Memoraĵo ....
- Vivo de la Grupoj
- Junulara paĝo


## - EN ESTONIA KONSULEJO -

Antaŭ la duamilito, la konsulo de Estonio en Havro estis S-ro Charles, grava importisto de ekzotaj lignoj.

Iun tagon (en I936 aŭ 37, mi ne ĝuste memoras), estona maristo venis al la konsulejo. Sed ve neniu en la oficejo konis la estonan lingvon. Iu provis la anglan, senskkcese. Alia provis la germanan, sed ankaŭ tiun lingvon la maristo ne parolis. Fine, iu rimarkigis ke tiu sinjoro portas la verdan stelon; do sendube li parolas Esperanton ( nia insigno estis ja konata de la oficistoj de tiu firmo ĉar pluraj el ili, kelkaj monatoj antaŭe, vizitadis la kursojn de F-ino Lidja Zamenhof). Aŭdante la vorton " Esperanto ", la maristo diris : " Jes, mi parolas Esperanton ". Oni venigis maljunan oficiston kiu bone parolis nian lingvon kaj multe ĝin propagandis inter siaj kolegoj. Tiel, la estona maristo fine povis klarigi sian aferon, per Esperanto, en la Estonia Konsulejo.

Tiu ĉi anekdoto estas vera. Samvespere, la maristo vizitis min kaj rakontis ĝin al mi. Poste, ĝi estis konfirmata de la esperantistaj oficistoj, dum kunveno de la grupo. Tio montras ke Esperanto povas esti utila, eĉ en plej neatenditaj okazoj.

E. NOEL - LE HAVRE -

# V I V O   D E   L A   G R U P O J

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

YVETOT.-
-------- La I4an de Januaro posttagmeze, kiel kutime, la Grupo festis la " Reĝojn " en la Junuldomo. Pli ol 50 personoj el Yvetot, Rouen, Le Havre, kaj Fécamp partoprenis tiun feston, kiu okazis en ĉeesto de la urbestro, D-ro Bobée, en tre gaja kaj vigla etoso. Je la fino, ankaŭ Kristnaska Patro venis kaj disdonis ludilojn al la infanoj.

La 3an de Februaro vespere okazis la monata kunveno de la Grupo. Bedaŭrinde, la nebulega vetero ne ebligis al Gilbert Bettencourt veni ĝis Yvetot por prezenti lumbildojn pri sia vojaĝo tra Germanujo, kaj la kunveno transformiĝis en konversacian vesperon.

P.Pottier -

-:-:-:-:-:-:-:-

VIRE. -
------- Okazas kurso gvidata, hejme, de S-ro Colleu (staciestro) kun 6 gelernantoj, /marde 20a30). Mi gvidas kursojn al 3 personoj. (Unu kurso okazas en la Junulardomo).

S-ro Colleu kaj lia edzino partoprenis en la Internacia Fervojista Kongreso okazinta en Clervaux (Luksemburgo) je la 6a / 9a de Oktobro I972.

La I4an de Januaro, Sacerdoto P. Vallée, membro de la Esperantista Grupo, festis sian Arĝentan Jubileon. S-ro Vallée kun S-to Baudry faris la meson dum la Federacia Kongreso en Vire, (Marto I972).

A. Legret -

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

ĈU VI SCIAS ??
=:=:=:=:=:=:=:

.... ke la germana p[illegible] " Europa Federala Partio " pledas oficiale en sia programo la enkonduko de Esperanto..

.... ke la Kongreso de S A T. okazos en Toronto (Kanado) : konvene elektita kongresurbo kiam oni scias ke, en la H U R O N A lingvo, " Toronto " signifas " renkontiĝ-loko " ....

(el SAT)

LE HAVRE

Sabate I6/I2/72 okazis nia Zamenhofatago. Post parolado pri la kreinto de nia internacia lingvo, ni aŭdis kelkajn esperantistajn muzikantojn kaj kantistinon, sed, kompreneble, ĉiuj ĥoris por la rekantaĵoj. Nia bona amiko Laney, kun sia kamarado, ofertis al ni esceptan iluziistan spektaklon kiu kontentigis ĉiujn. La grupanoj ĉeestis multnombraj al tiu agrabla kunveno.

La "reĝa festo " okazis la IIan de februaro. Ĉar multaj malsanuloj ne povis veni, ni nur estis 23 gesamideanoj. Tamen, la kunveno tre bone sukcesis en amika etoso; la junuloj aparte ĝuis la disdonadon de balonoj, kaj ĉiuj trovis plezuron en la kutimiĝanta " ceremonio " de la surprizkovertoj. La Gazetaro raportis favore pri tiu manifestacio.

Elektoj.- Dum la pasinta estrara kunveno de nia Grupo estis decidita sendi al ĉiu kandidato de la havra regiono leteron petante kion li proponos por akceli Esperanton... Ĝis nun, ni havas 2 respondojn ! N.P.

---

En la kadro de la MJC-semajno (semaine de la Maison des Jeunes et de la Culture), la Esperanto-fako partoprenis en la tutsemajna ekspozicio ĉe la Urbodomo. Tie, en bonege videbla loko, tabeloj pri Esperanto indikis la celojn kaj eblecojn de nia lingvo. Sur grandaj mapoj, pingloj montris la lokojn de la delegitoj de U.E.A. I) en Francujo - 2°) en Eŭropo - 3°) en la tuta mondo (sume 3.000 pingloj!)

La IIa de Februaro, tiu ekspozicio translokiĝis al la sidejo de la Junulara Kulturdomo kie " tago de malfermataj pordoj " permesis al la Havranoj konsciiĝi pri la diversaj aktivecoj de tiu Organizo. Tuta ĉambro estis je la dispono de la " Esperanto Grupo de la MJC ". Tie la publiko povis konstati la efektivan praktikon de Esperanto : ekster la jam menciitaj tabeloj kaj mapoj, paneloj pri nia ĝemelurbo Leningrad, aliaj kun poŝtkart - aŭ poŝtmarko-kolektoj vekis intereson ĉe la

vizitantoj, - abunda kolekto de libroj, gazetoj kaj esperantomemoraĵoj atestis pri la vivanteco de nia lingvo.

Granda danko ni ŝuldas al nia amiko Chalm pro lia grava laboro : ne nur pro la ekspozicio, sed ankaŭ pro la firmigo de Esperanto en la Junulkulturdomo pri kiu ĵurnalisto skribis : " La Esperanto fako de la M.J.C. estas sur bona vojo de disvastiĝo."

la H. G.

---

Ĉu vi sciias ??
-:-:-:-:-:-:-:- ke, en Usono, pluraj radio-stacioj : Walla, Portland, Columbus, elsendas Esperanto-kursoj... (SAT)

.... ke, en Bulgarujo, la ministra pri popola instruado nomis kvin lernejojn en 5 diversaj distrikój en kiuj okazos trijara eksperimento pri instruado de Esperanto.... (Heroldo)

---

SOLVO DE LA PASINTAJ KRUCVORTOJ :

Horizontale :
a - administri
b - brizo - Erin
ĉ - rok - mi - ioa
d -zo - taseg
e - obolo - ri
f - ti - oksimor
g - uzi - si - ima
ĝ - Jona - valid
h - onomastiko

Vertikale :
1 - abrikotujo
2 - dron - bizon
3 - mikozo - ino
4 - iz - colo - am
5 - nome - oks
6 - int - sivs
7 - se - tari - at
8 - tri simili
9 - Rio de - omik
IO - inaŭgurado

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

ĈU VI SCIIAS ? ?

..... ke, la Novjorka parlamentano SEYMOUR HALPERN submetis demandon pri Esperanto en ĉambro de la reprezentantoj.... (Heroldo)

V

NORMANDA FEDERACIO

- FEDERATION NORMANDE DES CENTRES CULTURELS d'ESPERANTO
C.C.P. ROUEN 2348 06 Z -

## URĜA ALVOKO

**Nova sidejo estas trovita por UFE en Paris. La plej grandan parton de la sumo ni disponas por ĝin aĉeti,** sed ankoraŭ mankas kelkaj brâketoj por ĝin finripari, ĉar ĝi ne estas nova. Bonvolu sendi vian kontribuon, eĉ plej modestan, al la ĉi supra konto. Antaŭan dankon. Listo de la donacintoj aperos en la venonta bulteno. Eblas ankaŭ prunti monon kontraŭ rentumo. Precizigu dorse de la ĉeko ĉu temas pri donaco aŭ prunto.

## - TRA LA FEDERACIO -

EVREUX : S-ino Garré-Bellettre, longjara fidela membro de UFE, estas malsana kaj priploras la forpason de sia edzo, S-ro Garré.
La 28an de januaro kunvenis la organiza komitato de la kongreso komuna al la normanda kaj pariza federacioj.
Kompleta programo kaj aliĝilo troviĝas en ĉi tiu bulteno.

FECAMP : la Grupo ankoraŭ ekzistas, sed dormetas.

LES ANDELYS : Fine de decembro, laŭ la proklamo de UNESKO "1972, internacia jaro de la libro " okazis en la junulcentro ekspozicio pri Esperanto-libroj. Malfermis ĝin la lerneja inspektorino kaj vizitis ĝin ĉefe geinstruistoj kaj gejunuloj. Sekve de tio, meze de januaro, malfermiĝis unuagrada kurso kun 8 gelernantoj. Gi okazas en la junulcentro, vendrede je la I8. 45. Komence de januaro, la grupo celebris la reĝan feston en tre gajo etoso.

VIRE : S-ro Colleu gvidas kurson merkrede je la 20.30 kun 6 gelernantoj. S-ro Legret instruas 3 personojn. G-roj Colleu partoprenis la IFEF-renkontiĝon en Clervaux (Luksemburgio) en Oktobro I972. La I4an de Januaro, S-to Vallée, grupano, festis sian arĝentan jubileon.

YVETOT : funkcias diversgradaj kursoj sub gvidado de G-roj Pottier.

## INFORMOJ
-:-:-:-:-

I°) Aperis la federacia poŝkarto, tre taŭga informilo por neesperantistaj francparolantoj. Vi povas mendi ĝin ĉe la federacia poŝtĉekkonto laŭ la jenaj prezoj (afrankite ) :

4 kartoj : I F. - I0 K. : 2 F. - 20 K. : 3,50 -
50 kartoj : 8 F. - I00 Kartoj : I5 F. -

2°) Por informi viajn konatojn pli komplete, uzu la broŝuron " Une langue Internationale ... " Prezo : 2,50 F. Mendu de S-ro Pottier - 2I, allée des Roitelets - 76 - YVETOT -

3°) Jen la Grésillon-a programo :

| | |
|---|---|
| II - 18/4/73 | : I2-a kultura semajno |
| I8 6 25/4 | : studsemajno |
| I - 8/7 | : renkontiĝo de esperantistaj fervojistoj |
| 8 - 22/7 | : seminario por geinstruantoj |
| 22 /7 - 5/8 | : internaciaj semajnoj |
| 5 - 26/8 | : studsemajnoj |
| 28 /8 - 9/9 | : kulturaj semajnoj |

Frue aliĝu : Esperanto-Kulturdomo - Grésillon 49I50 BAUGE

4°) UK en Beograd : UFE aranĝas aŭtobusan karavanon. Legu la detalojn en la " Revue Française "

5°) seminario por grupestroj : Caen (3-8/9) - anoncu vin tuj ĉe S-ro Pottier. Urĝas, por la bona organizado !

---

## FEDERACIA KONGRESO

Dum la ĝenerala kunveno de la normanda federacio okazos balotado pri la jenaj punktoj :

I°) la agadraporto de UFE (aperos en la februara N° de la revuo

2°) la financa raporto

3°) renovigo de I/3 de la Konsilio

Nur la membroj abonantoj de UFE, pli ol I8-jaraj, rajtas plenigi la ĉi suban voĉdonilon.

Instrukcioj por la balotado :

a) Metu la voĉdonilon en blankan koverton sen iu ajn indiko -

b) Fermu tiun koverton kaj metu ĝin en alian sur kiu vi skribos vian nomon.

c) Sendu la tuton al So Pottier, antaŭ la 20/4/73 -

Necesas, kompreneble, ke vi estu paginta vian kotizon por ke la kontrolontoj de la balotado sciu ĉu vi estas membro abonanto de UFE. Do pagu tuj ! Pli ol 22-jara : 38 F. - malpli ol 22-jara : 23 F. al la Fédération Normande des Centres Culturels d'Esperanto ROUEN 2348 06 Z. -

---

## V O Ĉ D O N I L O

I°) Ĉu vi aprobas la agaraprton de UFE por I972 ? Jes Ne Sindeteno

2°) Ĉu vi aprobas la financan raporton ? Jes Ne Sindeteno

---

## RENOVIGO DE I/3 DE LA KONSILIO

Bonvolu elekti 9 (naŭ) el la jenaj kandidatoj :

I) S-ino ALBAULT Odette (nova kandidatino)
2) S-ro BOURDEAUX André
3) " DESPINEY Roger (nova kandidato)
4) " MANCEAU Jacques
5) " MICOUD Fernand
6) " ROUGETET Gabriel
7) " ROUSSEAU Jack-André
8) " ROYER Pierre
9) D-ro TORTEL Jean-Luc (nova kandidato)
IO) S-ino VINCENT Jeannine

Por ke la bulteno validu, nepre forstrku 1 (unu) nomon. -

---

Informoj pri la Normanda Federacio daŭre akceptas la prezidantino :
- S-ino J. VINCENT - rue des Oiseaux - 27700 LES ANDELYS -

---

A T E N T U : Par manque de temps, il m'a été impossible de rectifier tous les programmes à cause d'un léger changement d'horaire. Veuillez m'en excuser et rectifier le vôtre . Merci.

Lire : Diservo : je la I8.I5 (au lieu de I8 H 30)

N. Peltier -

# J U N U L A R A   P A Ĝ O

ŜARADOJ aŭ REBUSOJ : (Atentu : vi trovos francajn silabojn (kiuj faros esperantan vorton)

**I**


Mia unua estas la 11a litero de le alfabeto
Mia dua servas por fari trikotojn
Mia tria estas la lango de la serpento
Mia kvara estas trinkaĵo
Mia tuto estas sumo de la tagoj


**2**

Mia unua estas altega, ronda aŭ kvadrata konstruaĵo
Mia dua estas alfluanta rivero kiu fluas en Angers
Mia tria estas tre uzata trinkaĵo en Anglujo
Mia kvara estas parazita planto uzata por dekoracio
Mia tuto estas doloriga verbo.

Annie Gaillard

---



Sylvie Caron

---




Tristan Lecoq -

SOLVOJ :

1 = K - Laine - dare - o - : Kalendaro
2 = Tour - Maine - thé - gui ÷ Turmentegi
3 = Beaŭ n'os fa riz tas nez nie am s tasse paire d'hie tas : Bono farita neniam estas perdita -

---

La Junulara Paĝo ne estas rezervita por Le Havre !

GEJUNULOJ ! sendu viajn ludojn aŭ viajn desegnojn.-

.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.

---

ĈU VI SCIIAS ? ?
-:-:-:-:-:-:-:-:-

... ke la membroj de OOmoto organizis " Japanan Vesperon " en Parizo : ĝi estis prezentita en Esperanto kun posta traduko en franca lingvo ......

... ke, laŭ enketo de la anoj de Brita Esperanto Asocio, 45 parlamentanoj favoras Esperanton kiel Internacia Lingvo (el 100 al kiuj estis demandata)....

( Heroldo )

... ke, en Le Havre, la librejo LEBRUN (ĉe l'Urbdoma Placo ) vendas la gramatikon de Couteaux, kaj la eldonon de " Marabout Flash " ......

-----------------------------------

DEMANDAS GEKORESPONDANTOJ :

- S-ro K.V. DIEM JAN
  7 Nieu Wenhuizen laan - Monniekendam - Nederlando -
- S-ro Dimitâr PETKOV STOJANOV
  Strato Vastaniĉeska - 1 - Govna-Ovjaĥovica - Bulgario -
  (por 13-14 jaraj)
- S-ino C. VOOREN
  21 Canaveralstraat - Kromenie - Nederlando -

---

Polycopié par le
GROUPE ESPERANTISTE HAVRAIS

Dépôt Légal Ier Trimestre
1973
La gérante : N.Peltier -